# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Junio : 1 2022


## PUNAJ DAMAĜOJ EN LA PROCESO DEPP KONTRAŬ HEARD

Sufiĉe diskonigita estas la ĵusa juĝa decido en la proceso de la aktoro Johnny Depp kontraŭ lia eks-edzino Amber Heard. La proceso komenciĝis kiam la ĉefrolulo de filmoj kiel "Piratoj de la Karibio" denuncis sian eks-edzinon pro la publikigo de informo en la usona ĵurnalo *The Washington Post*, tie ŝi akuzis lin pri hejma perforto. La jura proceso ĵus finiĝis per kondamno al ambaŭ partioj. Depp devos pagi al Amber Heard 2 milionojn da dolaroj kaj Heard devos mon-kompensi al Depp per 15 milionoj.



Johnny Depp kaj Amber Heard

Elstarinda estas la fakto, ke la mon-kompenso pagota de S-ino Heard, siafoje, dividiĝas en 10 milionoj kiel pago de kompenso pro la damaĝoj suferigitaj, plus 5 milionoj kiel punaj damaĝoj. Do, kio estas la punaj damaĝoj?

Oni povas diri, ke punaj damaĝoj estas plia paŝo okaze de kompenso pro la damaĝoj suferigitaj. Temas pri kondamno al kulpulo se oni juĝis, ke li agadis neglekteme, senatente aŭ misintence. Tiel, ekzistas punindaj agoj, kiuj ne povas esti punigitaj nur pere de mon-kompenso de la damaĝoj suferigitaj, sed ankaŭ per kroma mon-puno pro la forta socia rifuzo kiun meritas tiu ago. Do, en la kazo de Depp kontraŭ Heard, la mono kiun ŝi devos pagi, estas formita de:

- 10 milionoj da dolaroj kiel reparacio pro la damaĝoj aŭ molestoj kaŭzitaj, okaze de la publikigo de artikolo kaj misakuzo de hejmaj perfortoj.
- 5 milionoj, pro la fakto, ke ŝi faris tion misintence.

Ĉu ekzistas limoj por tiuj punaj damaĝoj? Jes, sed kompreneble tiuj limoj estas malsimilaj laŭ ĉiu nacia leĝaro. Tiel, ekzemple, en la leĝoj de la usona ŝtato Teksaso ekzistas limo

difinita en 750.000 dolaroj. Alifoje, tiu limo ne estas ekzakte kalkulita, male ĝi dependas de la mon-kompenso de la reparacio. Tiel, en Kolombio la Konstitucia Kortumo deklaris, ke la kompenso pro punaj damaĝoj neniam povus esti pli alta ol tiu difinita kiel reparacio pro la damaĝoj suferigitaj, ĉar tio povus kaŭzi ne-ĝustan enriĉigon de la viktimo.

# *Vorto de la Semajno*

**Asembleo**: Ĉefa interkonsiliĝa aŭ decida organo, precipe sur nivelo ŝtata aŭ interŝtata.

**Asembleano, asembleisto**: Membro de asembleo.

Sinonimoj: *parlamento, kongreso, renkontiĝo.*

De la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto okazos en la kanada urbo Montrealo la 107-a Universala Kongreso de Esperanto. Kadre de ĝi devos okazi la ĝenerala asembleo de Internacia Jurista Esperanto-Asocio. Se Vi estas membro aŭ simpatianto de nia asocio, bv. anonci vian partoprenon. Dankon!